NIA PONTO

Grupo Esperantista	Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre	☎: 944.164.492
E-48005-BILBAO (Hispanio)	☎ portebla: 696.613.958
Redaktas: Jesús-Miguel García Iturrioz	💻: tepgaitj@lg.ehu.es

Jar-kotizoj: Normala: 17 €. Speciala: 14 €. Familia: 30 €.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MARTO/APRILO 2003

NOVA ESTRARO.

Dum la pasinta ĝenerala asembleo, kiu okazis la 7an de marto, oni nomumis novan estraron; ĝi restas jene:

Prezidanto:	J. Miguel García Iturrioz
Vicprezidanto:	Patxi de la Hoz Méndez
Sekretario:	Sabin Orueta Mendia
Kasisto:	Eduardo Larrouy López
Voĉdonantoj:	Iñaki Vélez Ortiz
	Isaac García Redondo

Ni esperu ke ilia laboro estu fruktodona, ĉar parte ankaŭ okupiĝos pri la organizado de la venontjara EEU-kongreso.

TTT-EJO DE LA E-GRUPO DE BILBAO.

Danke al senlaca laboro de nia amiko kaj nuna Vicprezidanto, Patxi de la Hoz, nia E-Grupo jam havas TTT-ejon. Ankoraŭ la laboro ne estas finita (ĉu iam finiĝas la konstruado de tiaj montriloj?), do se vi trovus ian eraron, mankon aŭ forgeson, estu indulgemaj.

En la sama adreso ni rezervis lokon por informi pri la EEU-kongreso de la jaro 2004. Kompreneble, nun mankas ankoraŭ informoj, sed iom post iom, ni metos tie, ĉion, kio rilatiĝos kun la kongreso. La dreso de la nova TTT-ejo estas:

www.geocities.com/esperantobilbao

EEU-KONGRESO.

Ni jam faris la unuajn demarŝojn cele al organizado de EEU-Kongreso, en la jaro 2004, en Bilbao.

Dato (provizora): de la merkredo 25a ĝis la lundo 30a de aŭgusto 2004.

Kongresejo: Fakultato pri ekonomio de la Vaska Universitato.

Aliĝiloj kaj afiŝoj: pentristo helpis nin desegni ilin; la fono estos parto de abstrakta pentraĵo; estos prezentataj dum la hispana kongreso (julie, en Valencio).

Kotizoj: Ni povas anonci ke ili estos pli malmultekostaj ol tiuj de la pasinta kongreso en Verona. Samtempe, estos specialaj kotizoj por tiuj, kiuj aliĝos dum la hispana kongreso aŭ dum UK en Svedio.

Ret-adreso: Ni malfermis ret-adreson speciale por la kongreso. Ĝi estas:

Esperantobilbao@terra.com

TTT-ejo: Tiel kiel ni informas en la unua paĝo de tiu ĉi "Nia Ponto", informojn pri la kongreso vi trovos en:

www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

Samtempe, ni rememoras al ĉiuj bilbaoanoj (kaj helpemuloj ekster Bilbao) ke, ekde nun ĝis la komenco de la kongreso, **ni kunvenas ĉiuvendrede (7,30 – 9 h.)** en nia sidejo por pritrakti la organizadon de la kongreso, plani kaj taksi la plenumon de la diversaj demarŝoj. Ĉies helpo estas bezonata. Pensu ke temas pri la plej grava evento ĝis nun okazinta en nia urbo, ene de Esperantio.

NOVA E-KURSO ĈE LA VASKA UNIVERSITATO.

Unu jaron plian (jam la trian), disvolviĝas nova E-kurso ĉe la Vaska Univesitato. Ĉi foje aliĝis 16 gelernantoj; la instruado komencis la 10an de februaro kaj finos la 21an de majo. Kiel kutime, la instruisto estas J. Miguel García Iturrioz. Temas pri libervole elektebla studobjekto, oficiale agnoskita kaj kun valoro de 4,5 kreditoj (t.e., 45 horoj).

Nuntempe oni pritaksas la eblecon oferti tiun saman studobjekton por esti instruata pere de komputilo, ene de la tiel nomata "Campus virtual". En tiu "Campus", la gestudentoj ne estas devigataj ĉeesti la universitatajn ejojn; ili lernas pere de Interreto kaj la instruisto respondas la demandojn pere de retpoŝto. Tio permesas la aliĝon de studentoj el kiu ajn fakultato kaj el kiu ajn universitato (se estas antaŭakordiĝo kun la vaska).

KUNVENO DE EŬSKAJ ESPERANTISTOJ.

La sabaton12an de aprilo, en tipa restoracio de Bilbao, okazis komuna manĝo de bilbaoaj esperantistoj kun aliaj alvenintaj el Gipuzko kaj el Alavo; ankaŭ ĉeestis juna esperantistino el Bordozo. Entute, 12 homoj, nome:

El Bilbao: J. Miguel García, Patxi de la Hoz, Iñaki Vélez, Joxemari Sarasua, David Mediavilla kaj Alfredo Cuesta.

El Vitorio: Rafa Blanco, Natxo Apaolaza kaj Xabi Rico

El Gipuzko: Nicolás Gil kaj Javi López.

Temis nur pri renkontiĝo de malnovaj amikoj. Post la manĝado, ili promenis laŭ la rivero ĝis la muzeo Guggenheim kaj guis la ĵus inaŭguritan promenejon.



INTERVJUO EN RADIOSTACIO.

La 14an de aprilo, J. Miguel García estis mallonge intervjuata en "Radio Nacional". Temis pri 3-minuta intervjuo, kiun oni faras ĉiutage al iu bilbaoano kapabla alporti ian novaĵon.

Tempo mankis, sed tamen sufiĉis por paroli pri la venontjara EEU-kongreso, pri la E-kurso en la Vaska Universitato kaj eĉ iomete pri la preskaŭ centjara historio de nia E-Grupo.

La intervjuanto, ege agrabla kaj simpatia homo, restis je nia dispono por fari estontajn intervjuojn, pli longajn, kiam alproksimiĝos la kongreso. Li estas kuzo de nia samideano José Pérez-Salado Kamps, danke al kiu ĉio-ĉi realiĝis.

ĈU IMITINDA EKZEMPLO?.

... Por sproni la pretecon de lingva plukleriĝo, ekde 2004, ordinaraj GEA-membroj (GEA=Germana E-Asocio) estos nur tiuj, kiuj jam havas E-diplomon de Germana E-Instituto aŭ de Internacia E-Instituto. Ĉiuj aliaj estos "malordinaraj membroj" kaj pagos duoblan membrokotizon.

GEA-estrarano, kiu tamen volis resti anonima, komentis jene: "Estas simple la konsekvencojn de PISA: almenaŭ rilate la akuzativo la Germanaj Esperantistoj estonte estu en internacia komparo la unuarangajn". – Agnoskon de ordinara membreco vi ricevos nur sendante la originalon de via diplomo al la GEA-Prezidanto, sed nepre antaŭ la 1a de julio.

(Prenita el "Esperanto aktuell". 2/03)

ĜANGALO, LA E-PORTALO.

Ĝis nun en la reta Esperantujo mankis vera portalo, en la senco de noticejo, kun ĉiutaga aktualigo, kun pluraj kaj abundaj alir-ebloj, kun la plej diversaj ligiloj kaj elŝutaĵoj. Mankis! Ne plu mankas, ĉar ekde la 18a de januaro 2003 Esperantujo povas fieri pri posedo de unu el la plej modernaj informejoj de la reto: Ĝangalo – la E-portalo. TTT: http://gxangalo.com

(Informis: Marko Naoki Lins. Prenita el "Esperanto aktuell. 2/03)

NOTO: Li ne troigas. Se vi havas la eblon aliri Interreton eniru tiun portalon kaj certe vi surpriziĝos.

ALIĜOJ AL UK.

Ĝis la 20/01/2003 estis 1.042 aliĝintoj el 55 landoj. Svedio: 144; Francio: 137; Japanio: 113; Germanio: 111; Nederlando: 65; Finlando: 59; ... Hispanio: 3.

(Prenita el "Esperanto". 1156(2). Februaro 2003).

DENOVE EŬSKA VERKO TRADUKITA AL ESPERANTO.

La ĉefa verko de Jon Mirande Alparsoro (Parizo, 1925-1972), "La Baptofilino", kies originala titolo estas "Haur Besoetakoa" estis tradukita de nia amiko Joxemari Sarasua kaj eldonita de la brazila eldonejo "Fonto", kun monhelpo de la Labora Ŝparkaso de Eŭskio. Tiu ĉi amrakonto estis skribita en 1959, sed ne eblis publikigi ĝin ĝis 1970, kiam jam la aŭtoro rezignis pri nova verkado.

Ĉiuj recenzoj pri la traduko unuanime opinias ke estas ege bona kun tute moderna sed tamen akademia vortaro. Nia E-Grupo ankaŭ fieras pri ĉi tiu sukceso.